La UK (Universala Kongreso de Esperanto) ne estos ĉi-somere la sola monda renkonto en Montpellier. La unua laŭvice estos la futbalmondpokalo, parte ludota en nia regiona ĉefurbo, kaj pri kiu informas de longe diversaj rimedoj. La vendado de biletoj malkontentigis multajn amatorojn. El la 90 getelefonistoj-vendistoj la triono parolis nur la francan !

La dua estas sufiĉe priskribita kaj priskribata en nia bulteno. Pri la tria, ankaŭ okazonta en Corum en Aŭgusto, ĝi temos pri la studo de grundoj kaj koncernas geologojn.

Unu el la tri ricevos financon helpon de la Ministerio pri Edukado. Kiu laŭ vi ?

Prave, la lasta : la Ministro pri Edukado, Claude Allègre, tiel subvencias siajn eks-kolegojn. La unua havas sufiĉe (tro) da sponsoroj (patronoj). La dua tamen ricevas helpon de la loka urbestaro, de la regiono kaj de la regiona konsilio pri turismo.

Gejunuloj

Dank'al la refortiĝo de Jefe, kie kelkaj entuziasmuloj, al kiuj ne mankas iniciatoj, restrukturigis la asocion, gejunuloj el nia regiono kontribuas nun al la E°-vivo. Ludivine Delnatte estas la nova redaktorino de « Jeunesperanto info », Frédéric Durand kunorganizis la fiŝan semajnfino en Montagnac (kaj raportis por SFS), Damien Laurent progresis rapide en la lingvolernado (SFS havas spionojn ĉie !) kaj 3 gejunuloj eklernas la lingvon kadre de « Réinsertion et E° ». Gratulojn al ĉiuj ! Bonan kuraĝon !

Jefe jam organizis plurajn gastronomiajn semajnfinojn kaj planas aliajn. En Boulogne-sur-mer en Septembro estos ĉokolada semajnfino, en Diebolshheim (Elzaco) en oktobro estos saŭkraŭta kaj kiŝa semajnfino, apud Tuluzo fine de oktobro estos munĵetada semajnfino kaj en Ariège pana antaŭ-semajnfino. Aliĝilo haveblas de SFS (se vi estas pli ol 30jaraĝa, vi povas ankaŭ partopreni kun aldono de 50F). Apude detaloj pri tiuj eventoj.

Fiŝa semajnfino : en Montagnac, en la bieno « Grangette », disvolviĝis inter la 27a kaj 29a de marto la fiŝa semajnfino. Ĝi kunigis 18 junajn geesperantistojn el diversaj urboj (Toulouse, Lyon, Montpellier, Paris, Dijon) kaj eĉ el Katalunio. Dum tiuj tagoj ni frandis tre bongustajn pladojn de mugiloj, moruoj kaj salilokoj, kiujn preparis nia ĉefkuiristo Alain Fagot, kaj kukojn.

Ni profitis la geografian situon de la restadejo por viziti Balaruc kaj la romian teatron, kie okazos koncerto ĉi-somere dum la UK, kaj la kongresejon Corum en Montpellier.

La disvolviĝo de tiu semajnfino estis perturbita de la agresema manifestado de frapanta pigo, kiu bekfrapis ĉiujn fenestrojn de la dormoĉambroj frumatene ! Agrabla vekiĝo, despli ke la noktoj estis tre mallongaj, kiel kutime okazas dum tiaj renkontoj. Krome vizitis nin Jean Hénin kaj Jorgos, kiuj vespermanĝis sabate kun ni kaj Thierry Saladin, kiu kuntagmanĝis dimanĉe (fakte je la 14a horo kaj duono !).

Mi volas ankaŭ rakonti lastan anekdoton pri la nokta promonado sabate de kvaropo (Frédéric, Alain, Emilie kaj Rose), kiu provis trovi rosmarenon por la vespera tizano. Helpe de du lampoj, post longa serĉado gvidita de Rose, kiu ne havas tre akran senson pri orientiĝo, ni sukcesis pluki kelkajn tigojn de rosmareno.

Mi konservas bonajn memorojn de tiu sukcesa semajnfino (malgraŭ la veturadoj), kies organizado estis ŝatata pro la kvalito de la manĝoj kaj de la restadejo.

Kompreneble mi partoprenos la venontan semajnfinojn, la vegetaran, en Aime en Aprilo.

F.D.

Alvokoj :

Pli ol 20 geinfanoj partoprenis la Sat-Amikaran kongreson, inter ili kvin el Gorazde (Bosnio). Lastfoje ni alvokis por helpi la E°-klubon de Castanet-Tolosan venigi 10 geinfanojn el Sarajevo por tuta monato ĉi-somere (ĉiam validas la adreso de EKC - E° kultur-centro - 1 Rue Jean Aillet 31000 Toulouse - Tel 05 61 25 55 77 por donacoj).

Kiel jam klarigite, kongreso de infanoj disvolviĝos en Sommières dum la semajno de la UK. Restado de unu infano kostas proksimume 1500F. Alvenis pluraj petoj de nepagipovaj landoj. Kiu bonvolos kontribui por venigi plian infanon ? Uzu la poŝtekontron de la federacio (vidu la frontpaĝon), indikante la celon de via ĝirado. Anticipe dankas la organizantojn de la IIK (Internacia Infankongreseto)

ĈOKOLADA

Semajnfino

4-6 septembro 98 • Boulogne-sur-Mer

JEFO denove okazigas Ĉokoladan Semajnfino. Depost la unua Ĉokolada Semajnfino en septembro 1996, okazis jam pluraj Gastronomiaj Semajnfinoj kun plej diversaj temoj. Finfine revenas de la 4a ĝis la 6a de septembro 1998 la ĉokolado kiel temo de la Ĉokolada Semajnfino 2a. Post tre longa atendado ĉiuj frenezuloj renkontiĝos por frandi ĉokoladojn blankajn, nigrajn, laktajn, kun aveloj, migdaloj, rizo, ktp dum diskutrondoj, vagadoj, kunsidoj, ludoj, revadoj... Onidire plejbone oni malkovras kulturon ĉetable. Laŭ ĉi tiu principo JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn ligitajn al ĉokolado. Prokisme de Belgio, Nederlando kaj Britio estos ŝanco por renkontiĝi translime. Niaj eksterfranciaj amikoj ĝuos specialajn kondiĉojn.


Same kiel ni aranĝas por ĉiuj Gastronomiaj Semajnfinoj publikiĝos la receptareto de la semajnfino. Viaj receptoj interesas ĉiujn frandemulojn. Vi do proponu ilin al la organizantoj por preparado dum la renkontiĝo.

Chès rincontes gastronomiques ed'Espéranto-Jonnes sont ch'l'occasion ed'découvrir chès ceultures ed nous régions, avec d'chès thèmes gastronomiques, mais aussi avec chès contacts avec chès associations locales. Dins chelles-là, Artisans d'èch mon'ne qui nos f'ra profiter ed' ses produits naturels et ed' s'n'èthique d'eun' commerce équitape pour in'ne pus grinde solidarité sus tout' el planète. Tout partour el vie associative a in'ne importanche espéciale pour sensibiliser chès jonnes in faveur ed' leur ceulture régionale. In ara comme cha ch'l'occasion ed' découvrir inne lanque pendant chaqueune des tros rincontes d'èch l'aprèzeit 1998. Comme in s'ra à chaque fos près d'inne frontère, in invite-ra chès nouveaux espérantophones ed' chaque côte.

Ni gustumados diversajn specojn el diversaj fabri-kistoj. Ankaŭ en surprizigaj preparaĵoj ĉokolado aldonos ekzotikan guston. Jam pretas recepto, kiu kunligas la tradicion de Bulonjo-ĉe-Mar (ĉefa fiŝkaptada haveno de Francio) kaj la temon de la renkontiĝo.

Historio kaj estonteco
Bulonjo-ĉe-Mar gravas en la historio de la esperanta movado pro la unua universala kongreso en 1905. 1998 gravas por la franca esperanta movado pro la centjariĝo de la asocioj celantaj al disvastigo de nia lingvo. Dum okazigo de la Ĉokolada Semajnfino 2a apud Bulonjo-ĉe-Mar, ni pridiskutos la agadojn de JEFO dum la venontaj jaroj ĝis 2005.

Tiaj renkontiĝoj estas specifajo de la esperanto-junularo en Francio: internacia etoso kun iom-post-ioma enkonduko al uzado de Esperanto, samtempe gustumante frandaĵojn.



SAŬRKRAŬTA

kaj **KIŜA** *Semajnfino*

2-4 oktobro 98 • Diebolsheim • Elzaco

GEJ kaj JEFO kunorganizas la unuan franc-germanan gastronomian semajnfino. Estas tre modesta kromefiko de la kunlaborado kadre de OKEJ sed tiam ni rekte ĝuos la fruktojn de niaj strebadoj. Elzaco estas aparte grava regiono. Ĝi estis

preteksto por pluraj militoj kaj nun ĝi iĝas preteksto por amikiĝo.

De la 2a ĝis la 4a de oktobro 1998 estas nia Saŭrkraŭta kaj Kiŝa Semajnfino. Onidire plejbone oni malkovras kulturon ĉetable. Laŭ ĉi tiu principo GEJ kaj JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn de Elzaco. Jam ni promesas recepton, kiu kunligos kiŝon kaj saŭrkraŭton.



Kunlaborado inter GEJ kaj JEFO

Okaze de ĉi tiu malstreĉa renkontiĝo ni povos pridiskuti niajn agadojn ambaŭflanke de la landlimoj. Komunaj temoj traktindaj koncernas organizadon de kursoj, trejnadon de novaj aktivuloj aŭ strukturadon de lokaj agadoj. Longdaŭraj kunlaboradoj povas rilati al perretaj kursoj aŭ aliaj retaĵoj, kiuj ne postulas fizikajn kunvenojn.

Die «gastronomischen Treffen» der frz. Esperanto-Jugend bieten die Gelegenheit, Frankreichs regionale Kulturen mit kulinarischen Themen, aber auch durch Kontakte zu lokalen Verbänden, zu entdecken. Unter anderem wird uns der Verein «Handwerker der Welt» an seinen natürlichen Produkten und seiner Ethik bzgl. fairen Handels und weltweiter Solidarität bereichern. Überall sind Vereine von besonderer Wichtigkeit, um Jugendliche sensibler für ihre regionale Kultur zu machen. So werden wir bei jedem der drei Treffen im Herbst 1998 die Gelegenheit haben, eine Sprache, und somit einen Schatz im Herzen der Menschen, zu entdecken. Da wir uns jedesmal in der Nähe einer Staatsgrenze treffen werden, laden wir die neuen Esperantosprecher beider Seiten ein, die internationale Sprache hautnah mitzuerleben und viel Spaß zu haben.

Die gastronomische Traffa von da junga Esperantospracher (Espéranto-Jeunes) sen a Galagaheit, die Lawesgewohnheita von unsara Regiona za entdecca, natürlich durich die Gastronomie, awer oi durich Kontakt met lokala Vereiner. Unter dana Verinigunga gebt uns Artisans du Monde die Galagaheit, sini Naturprodukt za probiara und sini Ethik von garachta Händelmethoda za schätza, fer a gresseri Solidarität en der Walt. Eweräll spelt s'Veinslawe a sehr wechti Roll, fer die Jugend uff ehri regional Kultur ufmerksam za mache. So ha mer em Herbscht 1998, em Loif von drei Traffa, die Galagaheit, a Sproch, also der liabscht Schätz em Harz von da Litt za entdecca. Will mer jedesmol net witt von'ra Landesgranz sen, lada mer die neja Esperanto-spracher von beida Sitta von dana Granza in, sich iis Plasier metnänder en der Internationäl Sproch za unterhältä.



MUNĴETADA

Semajnfino

23-25 oktobro • Gaillac-Toulzou • apud Toulouse

JEFO denove okazigas Gastronomian Semajnfino en Okcitanio. Post la Fiŝa Semajnfino en marto, estas nun de la 23a ĝis la 25a de oktobro la munĵetada Semajnfino. Tio estos ripoziga punkto de elstara Esperanto-semajno. Post semajno plena je esperantaj okazaĵoj, vi ĝuos ripozigan Gastronomian Semajnfino, dum kiu vi povos ĝui okcitanian gastronomian kulturon. Onidire plejbone oni malkovras kulturon ĉetabla. Laŭ ĉi tiu principo JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn ligitajn al Okcitanio. Prokisme de Katalunio kaj Eŭskio estos ŝanco por renkontiĝi translime. Niaj eksterfranciaj amikoj ĝuos specialajn kondiĉojn.



Francio. 1998 gravas por la franca esperanta movado pro la centjariĝo de la asocioj celantaj al disvastigo de nia lingvo. Dum okazigo de la Munĵetada Semajnfino, ni ankaŭ pridiskutos la agadojn de JEFO dum la venontaj jaroj.


Etoso

Tiaj renkontiĝoj estas specifaĵo de la esperanto-junularo en Francio: internacia etoso kun iom-post-ioma enkonduko al uzado de Esperanto, samtempe gustumante frandaĵojn.

Kuirgvidado

Okazos kiel kutime dum ĉiuj gastronomiaj semajnfinoj trejnado al gvidado de kuirado. Tiuj, kiuj dezirus gvidi la preparadon de la pladoj, ricevos trejnadon por la tasko de ĉefkuiranto. Tiel ĉiu ajn povos lerni kiel doni indikojn kaj kunordigi plurajn kunkuirantojn.

Los rescontres gastronomicos d'Esperanto-Joves son l'occasion de descobrir las culturas de las nòstras regions, al travèrs de temas gastronomicos mas tanben pels contactes ambe d'associacions localas. Demest aquelas, Artisans del Monde nos farà profièitar sos produches naturals e de la siá etica d'un commerci equitable per una mai granda solidaritat a l'escala de la planèta. Pertot la vida associativa ten una importància particulara per sensibilisar los joves en favor de lor cultura regionala. Aurèm atal l'occasion de descobrir una lenga per cada tres rescontres a la tardor de 1998, adoncas tres maravilhas al còr del monde. Coma serèm a cada còp prèp d'una frontièra, convidam los esperanto-parlants nòus de cada man d'aquelas barrièras imaginaras a profitar d'aquelas escasenças per practicar la lenga internacionala per lor mai grand pluser.




Receptareto

Same kiel ni aranĝas por ĉiuj Gastronomiaj Semajnfinoj; publikiĝos la receptareto de la semajnfino. Viaj receptoj interesas ĉiujn frandemulojn. Vi do proponu ilin al la organizantoj por preparado dum la renkontiĝo.

Post la Universala Kongreso...

Estos okazo diskuti niajn planojn por daŭrigo de niaj agadoj por diskonigo de Esperanto en



PANA

Antaŭ-semajnfino


22-23 oktobro • Irazein, Arrout, Ballagué • Ariège

Jen unika ŝanco malkovri regionon de Francio (iom pli sude de la Munĵetada Semajnfino) kaj plilongigi vian restadon en pirenea Francio. Lokaj esperantistoj proponas al vi pasigi du tagojn kun si kaj malkovri sian vivmanieron for de urbaj zorgoj, simple kaj nemultekoste... Se vi interesiĝas pri tio, kontaktu por pli da informoj:

Christian Lavarenne, Presbytère, FR-09800 Balagué. Tel. +33 5 61 04 70 66.

Programo:

- Jaŭde: vizito de asocia muelejo en Irazein kaj preparo de la pasto kun ĵus-muelita faruno. Mana knedado de la pasto kaj bakado en profesia lignofajra bakujo. Ĉe-kamena vespero kun rakontoj kaj kantoj.
- Vendrede: nova bakado ekde la 8a matene, promenado al la du aliaj vilaĝoj laŭ la padoj...



FESTO

Junulara Programo de UK

1-8 agosto 98 • Montpellier • Okcitanio (Sud-Francio)

Ci jare, FESTO okazos kiel junulara programo de UK.

Por partopreni, nur bezonas aliĝi al UK.

Grave: se vi estas malpli ol 20, aliĝo estas senpaga!!!

Dum FESTO, vi povos ambaŭ ĉeesti en la ĝenerala programo de la kongreso aŭ partopreni junularajn aranĝojn. Ni zorgos pri junularaj ĉiutagaj trinkejo, diskoteko, varmujo kaj diversaj aliaj surprizoj...

Por tiuj servoj, ni povos ĝui apartan kaj escepte komfortan lokon por niaj programeroj (15 minutojn piede de la kongresejo). Okazos publikaj koncertoj de famaj esperanto-grupoj kaj de ne-esperantistaj grupoj (ekzemple

en okcitana lingvo) kiuj ankaŭ emas kanti en esperanto. Kaj se vi ne emas ĉiam plaĝumadi aŭ sportumi, ni aranĝas la aferon por ke vi distriĝu per migradoj, ekskursoj, diskuttrondoj... Krom la programo, ni zorgas por proponi al junuloj malmultekostajn loĝ- kaj vespermanĝeblecojn. Tial ni rezervas amasloĝejon tre proksime de la kongresejo (7 minutojn piede). La prezoj de la amasloĝejo inkluzivas matenmanĝojn kaj ni sukcesos proponi vespermanĝojn je tre favora prezo se oni enskribiĝas antaŭe.

Venu multnombraj en Montpellier, en 1998, ni plijunigos UK-n!

Informpetoj: jefo@esperanto.org • Sylvie Roques 8, rue Jean Soula FR-31240 ST JEAN

Diversaĵoj

12

Vidpunkto

Leteroj de legantoj
(Midi Libre : 5 V 98)

Euro

■ Par 334 voix contre 49, les députés ont accepté le passage à la monnaie unique. Mais, si nous réfléchissons un peu, n'est-ce pas une attitude suicidaire ?

Pour parvenir à respecter les critères de convergence, il a fallu mener des politiques d'austérité qui ont eu pour conséquence de mécontenter l'opinion : il suffit de penser aux grèves de novembre-décembre 1995, au mouvement des routiers de la fin de l'année 1996, à la défaite de l'ancienne majorité RPR-UDF, aux élections de 1997... et ce n'est pas fini.

Si la monnaie unique devait se mettre en place le moment venu, le pire pourrait se produire en raison du fait de l'existence d'économies trop divergentes sur le continent européen d'une part et, d'autre part, d'une cacophonie linguistique.

Effectivement, les Etats-Unis d'Amérique ont un avantage sur les pays de l'Union européenne : un espace linguistique unique favorise une plus grande mobilité de la main d'œuvre.

Ne vaudrait-il pas mieux travailler à une union linguistique européenne, en décidant, par exemple, qu'une langue comme l'esperanto parce que facile à apprendre, devienne une langue commune à tous les Européens ?

Patrick LASSIS
(Béziers)

**Ĉu la legantaro vere opinias,
ke la lingva problemo estas
prioritata ?**

Vidpunktoj

« En SFS ne devus esti atakoj kontraŭ E° kaj la esperantistoj ». Tiel esprimis sin unu el niaj legantoj, li ne estis la sola, kiun ĝenis la enkonduka frazo de « Réinsertion et E° » : l'E° en 1997 ne se porte pas si bien que cela en France et notamment en Languedoc-Roussillon.

Kompreneble respondecas pri tiu aserto RE kaj ne SFS ; ĉiu havas la rajton sin esprimi ! Ni ĉiuj dezirus pli grandan lokon en la instrusistemo por E°, ktp. Ni provas konigi E-on kaj rifuzas neniu kontribuon. Eble mankas kunlaborado inter la diversaj bonvolemluloj...

E° en LR ne fartas pli malbone ol en aliaj regionoj kaj depost la komenco de la jarcento - por kompletigi la artikolon de « Midi Libre » sur paĝo 5 - sin sekvis pluraj generacioj de esperantistoj, kiuj provis antaŭenigi la internacian lingvon.

Kritiko estas facila, arto malfacila.

Invito al Cevenoj

la 20an kaj 21an de Junio

por malkovri la lokajn flaŭron/faŭnon, por interŝanĝi ideojn pri diversaj temoj, por babili, diskuti, klaĉi, por muziki, kanti, brui, por aŭskulti Vinicius, junan Brazilanon, por renkonti aliajn esperantistojn, ktp. Tranoktado eblas en etaploĝejo (40F), manĝoj prepareblas samloke.

Kontaktadreso :

Esperanto-Lafigère-07140 Malarce
Tel 04 75 39 99 79 →

Instruisto bezonata

por la dua duono de Julio en tristela tendumejo de Cassagnabère-Tournas (31) apud Aurignac. La E°-instruisto ricevos senpagan tendumadon kaj manĝojn sed ne salajron.
Telefoni al 05 61 98 71 00

Korespondpeto

« Karaj geamikoj, Mi Galina Gulickaja, 50j., interesiĝas pri ĉio, deziras korespondi kun francaj geesperantistoj. Mi intencas partopreni la kongreson en Montpeliero.

Estime,

Galina Gulickaja,
Rusio, 214031

u. Smolensko, a/k n 104 «

Kiu bonvolos korespondi ?

Forlasis nin

Raymond Péraire, kiu biciklis tra la mondo en la 60dekaj jaroj kaj rakontis pri siaj spertoj en « Tra la mondo per biciklo » ;

René Centassi, kunaŭtoro de « L'homme qui a défié Babel » ;

Roland Grandière, kiu longe respondecis pri Sat-Amikaro.

4a renkontiĝo de
E-TERGLOB-AMANTOJ



20-21 junio en THINES

"okazas" n° 4.

Parus ou à Paraître

o "Une Nouvelle Affiche"

Une nouvelle affiche, suite aux derniers stages I.A.S.I., va voir le jour avant l'été: elle sera bien sûr présentée avec une accroche CONGRES UNIVERSEL. Elle disposera d'une place pour que chaque groupe espérantiste puisse la personnaliser. Le prix de vente sera très bas. Projet d'édition 1000 à 2000 ex. (Inf. Bruno FLOCHON, tél: 04 78 48 00 40)

o "Parlons Espéranto"

Une nouvelle grammaire en français "Parlons Espéranto", publiée par L'HARMATTAN (déjà éditeur du fameux livre de Claude Piron: Le Défi des Langues). Ce livre de Jacques Juguin comportera aussi un historique culturel et fera dans les 300 pages. Il sera vendu au stand ESPERANTO-FRANCE du "Libroservo" du Congrès Mondial 98 à Montpellier.

Nos hommes politiques et l'espéranto

Difficile de savoir précisément ce que pensent nos hommes politiques concernant le problème linguistique et l'espéranto. Parfois, ils affirment une chose et peu de temps après disent le contraire. Allez savoir !

M. Allègre, notre ministre de l'éducation, parle un jour de l'anglais comme d'une nécessité vitale pour les jeunes pour dire ensuite qu'il veillera à ce qu'il ne soit pas en situation de monopole. Concernant l'espéranto, ses services ministériels rabâchent l'argument éculé : « faute de support littéraire, historique ou géographique, comparables à ceux d'une langue classique ou vernaculaire, l'espéranto n'a pu être retenu parmi les langues présentées aux examens »

M. Chirac se veut à la tête de la francophonie. Il avoue ne pas utiliser l'anglais dans les discussions officielles car « il faut être sûr d'être bien compris » mais y avoir recours à l'étranger dans ses conversations avec des amis. Selon lui, l'idéal serait que les Européens connaissent leur langue maternelle et deux autres langues. S'il a autrefois, en tant que président du conseil général de Corrèze, soutenu une motion favorable à l'espéranto, il a dernièrement, très diplomatiquement, refusé la présidence d'honneur du congrès de Montpellier.

Mais il arrive qu'étant ministre on tienne un langage plus diplomatique que précédemment. Mme Ségolène Royal, ministre déléguée chargée de l'enseignement scolaire, qui avait autrefois tenu des propos peu amènes sur l'espéranto, a changé de ton : « s'il s'agit d'une langue commune, toutes les expériences qui ont été faites n'ont pas été probantes, même si rien n'interdit de dire qu'elles seront un jour couronnées de succès » et elle ajoute : « votre combat, comme celui de beaucoup d'autres, mérite d'être encouragé, même si l'Union Européenne est plutôt en faveur de la généralisation de l'apprentissage de deux langues européennes en plus de la langue maternelle ».

Mme Dominique Voynet, ministre de l'environnement, qui estimait plus tôt ne pas avoir « de temps à perdre pour ces conneries-là », s'est aperçue lors du sommet de Kyoto fin 97, que « toutes les discussions techniques se sont déroulées en anglais, sans la moindre traduction, alors qu'il s'agissait d'une conférence des Nations Unies » et que « trop de délégués ont été ainsi mis en situation d'infériorité, dans l'incapacité de répondre efficacement, de faire entendre leurs arguments ». Il ne reste plus à Mme Voynet, ainsi qu'à ses homologues, qu'à bien réfléchir s'il n'existe pas une autre solution, sans la rejeter à priori !

J.H.

TOI, FOOTBALLEUR DE LA COUPE DU MONDE

La Charte du Fair-play:

en forme de poème
des élèves du
Collège H. Matisse
de Choisy-le-Roi (94),
qui devrait être lu
en quatre langues
dont l'espéranto
à la télévision
lors du premier match
de la Coupe du Monde




La charte traduite en Esperanto

(langue créée en 1887 par Zamenhof)

- Vi, piedpilkisto de la monda pokalo
1. Revigu nin ĝentile ludante
Bela ludo rimupacamante
 2. Respektu strikte ludregulojn
Kaj feliĉigu apogulojn
 3. Respektu sen protest' ludjuĝecon
Montru al ni vian fidelecon
 4. Respektu kontraŭulojn, partnerojn
Kaj lasu en vestejo kolerojn
 5. Forpelu perforton el sinrego
Restu ĉiunomente memrego
 6. Akceptu malvenkon sindoninte
Kaj venkon festu amikiĝinte
 7. Revigu nin, montriĝu solidarec'
Nun niaj revoj estiĝu realec'

LA CHARTE

- Toi, footballeur de la Coupe du Monde
1. Fais nous rêver en jouant fair-play.
Que le beau jeu rime avec paix.
 2. Respecte strictement les règles du jeu
Et rends tes supporters heureux.
 3. Respecte l'arbitre sans contester
Pour nous montrer ta loyauté.
 4. Respecte tes adversaires comme tes partenaires
Et laisse tes colères au vestiaire.
 5. Bannis la violence de ton comportement.
Reste maître de toi à tout moment.
 6. Accepte la défaite en ayant tout donné
Et fête ta victoire avec sportivité.
 7. Fais-nous rêver, montre-nous ta solidarité.
Alors, nos rêves seront réalité.



Diŝtra Paĝo Krucvortoj

s : sone

VERTIKALE

- 1) Bovaj(o).
- 2) Ne nur teori(a).
- 3) Kuir(i) la antaŭlastan / Difektita artik(o).
- 4) Haŭta malsan(o) / s : Karesa nomo.
- 5) Sufikso / Orbitoplen(o) / Latinlitera.
- 6) Pip(o) / s : Eklezia tribunalo.
- 7) Senorda tuto / Lignoboato.
- 8) Pleje malgrandig(i).
- 9) Ŝildokolor(o) / Diven(i) aŭ deĉifr(i).
- 10) Ĵetlini(o).


I	M	O	N	T	P	E	L	I	E	R
II	O	F	T	A	L	M	I	T	O	■
III	N	E	S	T	O	R	M	E	Z	O
IV	T	R	■	A	S	K	A	R	I	D
V	P	E	R	M	I	■	K	B	N	A
VI	E	M	■	O	V	I	■	I	■	L
VII	L	U	M	■	O	N	D	■	F	I
VIII	I	L	I	A	■	D	O	R	I	S
IX	E	O	L	I	T	I	K	■	R	K
X	R	J	■	R	A	G	T	I	M	O

Solvej de la 143-a

HORIZONTALA

- I) Metiist(o), kies filo famiĝis.
- II) Almenaŭ dufoje kredant(o) / s : Paŝo.
- III) Ostokaĉo / Felkolora.
- IV) Iam invadema popolo.
- V) s : Ŝuo / Finfine miri / Ne sole.
- VI) Dekorita mur(o) / s : Lacerto.
- VII) Kolorlud(i) / Kie ?
- VIII) Furaĝ(o) / Birdo tage, konstelacio nokte.
- IX) Muzikpec(o) / Elementosimbolo.
- X) Art(o) kaj teori(o).

BOPARO.



Limdato estas limdato !
Pro nerespekto de tiu limo, tiu-ĉi SFS ege malfruas.
La venonta SFS devas nepre aperi antaŭ la Universala Kongreso, do en Julio.
Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la fino de Junio kaj ne poste al :
SFS ĉe Jean Hénin Beauregard, Route de Montcayroux, 48500 La Canourgue
Tel/Fakso : 04 66 32 86 36
Anticipan dankon !

14